(1) forigi la problemon ne science sed politike per altrudo de la origina lingvo de forta parolantaro - la aliaj lingvoj tiam ne plu estas nepre konsiderendaj ĉar ekstermitaj (lingvoimperiismo) aŭ dialektigitaj (lingvofeŭdismo);
(2) kontentiĝi pri la komparado de la ekzistantaj lingvoj (historie evoluintaj, ne konscie evoluigitaj) cele instruadon de fremdlingvoj kaj tradukadon;
(3) trovi per sciencaj rimedoj taŭgan komunan interkompreniĝlingvon por apliki ĝin en la propra influkampo kaj ĝin eventuale proponi por pli ĝenerala enkonduko per politikaj rimedoj.

La unua eblo ja konformas al ne nur historiaj klopodoj sed ne estas konsiderinda por nia celo, ĉar ĝi nek malfermas vojon difini interlingvistikon nek estas agordigebla al la ideologio de AIS. La dua eblo konstituas interlingvistikon en la senco de teorio pri rilatoj inter lingvoj historie evoluintaj. Surbaze de nia pracelo tia difino de interlingvistiko estas malaprobenda, ĉar ĝi ne inkluzivigus la pritrakton de ILo. Tia nocio (do la interlingvistiko en la senco de Wandruschka) estu pli trafe nomita "kompara" aŭ "kontrasta" lingvistiko.

La tria eblo kondukas al taŭga difino de interlingvistiko. Tiucele utilas diferencigi inter diversaj tipoj de eblaj interkompreniĝlingvoj:

1. ekzistantaj lingvoj, kiuj

1.1 estas parolataj kiel originaj lingvoj de hodiaŭaj parolantaroj

1.2 ne estas parolataj originaj lingvoj sed

1.21 ja estis en la pasinteco tiaj parolataj originaj lingvoj

1.22 neniam estis originaj lingvoj

2. ne ekzistantaj sed eblaj, por certaj celoj eble evoluigindaj lingvoj.

Principe ĉiu lingvo povas roli kiel interkompreniĝlingvo. Sed: "AIS celas esti la realiĝo de la revo de Komenski pri internacia scienca akademio uzanta facilan, precizan kaj neŭtralan lingvon." (SubS de AIS, 1988, p.3, vd. anka'u Barandaovsk'a, 1990). Tial sekvas el nia pracelo, ke interkompreniĝlingvo taŭga kiel objekto de la difinenda interlingvistiko devas esti neŭtrala, t.e. ne origina lingvo (identigilo) de iu el la partoprenantaj aŭ partoprenontaj parolantaroj. Tia neŭtrala interkompreniĝ-lingvo estas ekzemple la Angla en la Hinda Respubliko (Bharato), aŭ la Franca en eksaj francaj, plurlingvaj kolonioj. Por AIS kiel internacia Akademio interkompreniĝlingvo nur povas esti neŭtrala en la senco de mondvasta neŭtraleco. Tial nur la lingvoj 1.2 kaj 2 estas por nia celo konsidereblaj kiel "neŭtralaj". Celante niacele utilan difinon de interlingvistiko ni deklaras, ke ĝia temo estu "interlingvoj" kaj ke interlingvo laŭ trovota difino estas neŭtrala. Decidenda estas ankoraŭ, ĉu ni nomu ĉiun neŭtralan lingvon "interlingvo" aŭ eble nur lingvojn de la grupo 1.22, t.e. ekzistantajn (interhomajn) planlingvojn. La decido estas pravigenda surbaze de nia pracelo.

Kadre de la Esperanto-Movado troviĝas ie-tie la tendenco diferencigi inter ILo kiel la ununura "vera" , nome socie enradikiĝinta planlingvo kaj la aliaj plan-"lingvoj", al kiuj oni emas atribui nur terminojn kiel "lingvoprojekto" aŭ "semiplanlingvo". Tio principe eblas en interfilologio sed ne taŭgas por la difinenda memstara lingvistiko, ĉar la uzata kriterio de lingvo rilatas al la parolantaro aŭ la literaturo, do al fenomenoj, de kiuj ni jam abstrahis.

(Se la gramatiko kaj la vortprovizo de lingvo estas difinitaj ili ja ne ŝanĝiĝas pro tio, ke kroma persono ilin lernas kaj aplikas - kial ili do nur tiam estu nomitaj "planlingvo"?) Same kiel ILo ankaŭ Volapük, Ido kaj aliaj estas konsiderendaj kiel "planlingvoj". Krome ekzistas ankaŭ nekompletaj gramatikoj kaj vortaroj de ne finplanitaj lingvoj". Se oni ne nomas ankaŭ ilin "planlingvoj" oni nur povas diri, ke - (tamen:) planlingvoj. Se oni ne nomas ankaŭ ilin "planlingvoj" oni nur povas diri, ke planlingvo estas planita sed ne, ke ĝi en iu historia tempointervalo (kiam ĝi ankoraŭ ne - plene - ekzistis) estis planata aŭ planota, kio estus absurda. Oni do faru la diferenco per adjektivoj: disvastiĝinta planlingvo, parolata planlingvo, skizita planlingvo (ĉiuj estas ekzistantaj planlingvoj, do lingvoj el la grupo 1.22) kaj projektita (ne ankoraŭ ekzistanta sed ebla) planlingvo. Ne taŭgas por nia celo limigi la terminon "interlingvo" al ILo, ĉar

(1) lingvistika pritrakto de ILo, Ido, Volapük kaj aliaj iam kaj iom disvastiĝintaj aŭ

eĉ nur finplanitaj planlingvoj same eblas, tiel ke la redukto al ILo ne estus science pravigebla (la fakto, ke AIS uzas nur ILon estis esence politika decido, ne konstato de maltaŭgeco de alia planlingvo)
(2) la elekto de ILo kiel precipa interkompreniĝlingvo de AIS kaj la ne-uzado de aliaj planlingvoj kadre de AIS ne signifas ke la akademio apartenas al la Esperanto-Movado pro partieca propagando de ILo, sed ja estas tiusence miskomprenebla; per neŭtraleco de la kadre de AIS starigenda fako "interlingvistiko" eblas plialtigi la sciencan reputacion; (3) AIS celas kontribui al la plenumo de la programo de Descartes kaj Komensky rilate "kreon de facila, preciza kaj neŭtrala lingva komunikilo de la scienco" (SubS de AIS, 1988, p. 3) menciante iliajn skizitajn planlingvojn, kiuj do ne povas resti ekster la kadro de utile difinita fako "interlingvistiko";
(4) de la ununura planlingvo grava por AIS, do de ILo, estas en interlingvistikaj kursoj nepre pritraktendaj ankaŭ la metasciencoj, do krom la koncernaj filozofio, pedagogio, kaj (almenaŭ:) lingvistika verkaro ankaŭ ĝia historio, al kiu minimume apartenas Volapük, Ido kaj la laboro de IALA;
(5) evidentiĝis, ke por la perkomputila uzado de ILo, ekzemple por la aŭtomataj tradukado kaj dokumentado (vd. ekz. Maxwell, 1991) ILo ja plejgrandparte bone taŭgas sed indas esti pliperfektigita; tial la limigo de la difinenda interlingvistiko al la pritrakto de jam planitaj lingvoj ne estus kontentiga - dezirindas inkluzivigi la teknologion de la lingvoplanado, do la teorion de la ne jam ekzistantaj sed eblaj planlingvoj (grupo 2) "konstruiga interlingvistiko".

Tial ni inkluzivigas ĉiujn (ekzistantan aŭ eblan) planlingvon en la nocion "interlingvo". Sed estas utile, plivastigi ĉi tiun nocion per inkluzivigo ankaŭ de la "klasikaj lingvoj" (grupo 1.21), tiel ke la "neŭtralaj interkompreniĝlingvoj" estu nomitaj "interlingvoj". Ni pravigas tion per la jenaj konsideroj:
(1) Descartes kaj Komensky antaŭvidis planlingvon kiel neŭtralan interkompreniĝlingvon kiu iam transprenu la rolon de la neŭtraliĝinta Latina (vd. ekz. Barandovskà, 1979); estas do almenaŭ kadre de AIS nature konsideri tiun rolon kiel rolon de grupo da lingvoj, kiujn oni trafe nomas "interlingvoj".
(2) ILo troviĝas en la lingvospektro (Frank, 1982) inter la aprioraj kaj la aposterioraj planlingvoj - la plejmulto kaj la pli novaj de ĉi tiuj radikiĝas en la Latina; la faklingvaj neologismoj de ILo venas precipe el la Latina kaj Greka; Zamenhof mem konis kaj ekspluatis ĉi tiujn klasikajn lingvojn; akiri bazajn konojn de klasikaj lingvoj, minimume de la Latina, tial apartenu al studado de interlingvistiko. (3) AIS agnoskas la daŭran gravecon de la Latina per la unuavice Latina, duavice ILa vortigo de la sciencistaj gradoj agnoskitaj de AIS.
(4) La klasikaj lingvoj, precipe la Latina sed ankaŭ la Greka, Sanskrit, Araba kaj China, estas en la filologia mondo taksataj gravaj kaj havigas prestiĝon al ilin inkluziviganta fako interlingvistiko. -

Se ni do difinas la temaron de interlingvistiko, nome "la interlingvojn", kiel la neŭtralajn interkompreniĝlingvojn inter homoj kun diversaj originaj lingvoj ni konsciiĝas, ke ni ne atingis centprocentan precizecon. Pro la sukceso de ILo intertempe ekzistas centoj da homoj, kies unua lingvo (do tiuscence "gepatra", "denaska", "identiga", "etna", "origina" lingvo) ĝi estas - tiel perdante sian striktan neŭtralecon kaj komencante historian evoluon ne planitan per la konscia evoluigo de sia fundamento;

tamen ILo apartenas al la "malpreciza aro" de la planlingvoj kun sufiĉe alta apartenecgrado. Aliflanke la klasikaj lingvoj ne ĉiam estis kaj nek abrupte nek perfekte fariĝis neŭtralaj; ilia scienca pritraktado apartenas kun sufiĉe alta apartenecgrado al la ne tute precize difinebla nocio de interlingvistiko ekde la evolustato atingita kiam ili ne plu rolis kiel identigilo de iuj popoloj.

Resume la temo de la utile difinenda interlingvistiko estas interlingvoj, kiuj estas por tiu rolo aŭ taŭge elektitaj el la aro de la klasikaj lingvoj aŭ taŭge planitaj aŭ principe planeblaj.

4. Celoj kaj metodoj de la interlingvistiko

La demando, kiu estas "la plej bona interlingvo" estas sensenca, se oni ne havigas la kriteriojn de tia optimumeco. Tiaj kriterioj de prijuĝado ne povas esti trovataj ekskluzive en la kadro de la sciencoj sed baziĝas parte sur tio, kion oni volas atingi per interlingvo, do sur normo. Unu el la celoj de la interlingvistiko povas esti, evoluigi la metodaron por trovi por ĉiu tasko, kies plenumo bezonas lingvon, la plej bonan interlingvon - kaj por donita interlingvo la kampon kaj manieron de ĝia celkonforma aplikado.
El tio sekvas aro da subceloj:
(1) starigi aron da diferencigaj ecoj de interlingvoj kaj tiubaze priskribi kaj kompari ilin
(2) evoluigi kriteriojn kaj metodojn por la celkonforma (plu)evoluigo de interlingvoj
(3) reliefigi la utilecon de planlingvoj por la lingvistiko kiel sciencaj modeloj de klasikaj kaj neneŭtralaj lingvoj
(4) evoluigi kaj apliki (perhome aŭ perkomputile aplikeblajn) metodojn por la uzado de interlingvo, precipe de ILo, kiel referenc- kaj pontolingvo por plurlingvaj fakterminaroj, regularoj kaj dokumentad-sistemoj, same kiel por la tradukado
(5) esplori kaj pliperfektigi la utilon de planlingvoj, precipe de ILo, kiel instruaĵmodelo taŭga per tiubaza lingvo-orientiga instruado por la pli lernplifaciligo de klasikaj kaj neneŭtralaj lingvoj.
Evidente pro la fokusigo de la interlingvistiko al la planlingvoj la tradiciaj metodoj de la lingvistiko ne sufiĉas adekvate pritrakti la temon. Ĉar lingvistiko pri neplanita lingvo devas eliri el la ekzistanta tekstaro malantaŭ kiu oni celas malkovri gramatikon kaj aliaj strukturredundancojj. Inverse de planlingvoj unue ekzistas la gramatiko kaj la vortaro, surbaze de kiuj reguloj por la produktado, analizado kaj korektado de tekstoj estas starigeblaj. Krome la planiteco de planlingvoj plifaciligas la perkomputilan programigon de ilia aplikado, tiel ke la interlingvistiko havigu la elementan parton de komputillingvistiko kaj enhavu ĉi tiun parton kiel unu el siaj plej gravaj branĉoj. El tio evidentiĝas, ke almenaŭ parto de la interlingvistiko ne povas aparteni al la humanistika lingvistiko sed al la lingvokibernetiko.

Laŭ siaj metodoj la interlingvistiko parte estas nomoteta, parte ideografia, kaj ambaŭ partoj, la kibernetika kaj la humanistika, estas samgravaj. Tio validas por la komunikadsciencoj entute, en kiuj la interlingvistiko estas enkadrigebla.

5. Kursplanado, esploro kaj evoluigo en la kampo de interlingvistiko

La sekcioj kibernetiko kaj humanistiko de AIS starigis komunan studadplanon pri

komunikadsciencoj, kiuj devigas la studentojn minimume po unu triono de la studunuoj akiri en la humanistika kaj la kibernetik sekio. (Vd. SubS de AIS, 1988, p. 7, 9.) Laŭ la sekcio, de kiu estas celita sciencista grado, oni elektu la trian triononon kaj la temo de la scienca verkaĵo. La kadraj kondiĉoj de komunikadsciencaj studoj estas en San Marino ŝtate aprobitaj kaj konformas al la preskriboj de aliaj universitatnivealj klerigejoj, ekzemple al la studadregularo por komunikadsciencoj en la Teknika Universitato de Berlin. Kursplanado por interlingvistika studado do okazu prefere en la sufiĉe tolerema kadro de la komunikadscienca studadplano. Laŭ tiu necesas akiri por la ŝtupo de la bakalaŭreco minimume 40 komunikadsciencajn studunuojn, ĝis la magistreco aliajn. (La sama kvanto povas esti akirata en aliaj fakoj.) Unu studunuo estas akirebla per kurso en la amplekso de 8 - 15 studhoroj.

Al la unua triono (13 - 14 studunuoj ĝis la bakalaŭreco) apartenas minimume 4 studunuoj pri la jenaj devigaj kibernetikaj instruaĵoj: teorio de informacio kaj kodigo, psikokibernetiko, ĝenerala teorio de informprilaborado, programado de komputiloj. Al la dua triono apartenas 4 studunuoj pri la devigaj humanistikaj instruaĵoj interlingvistiko, ĝenerala psikologio, merkadkomunikado kaj fremdlingvo. Al la tria triono apartenas kaze ke la sciencista grado estas celita en la kibernetika sekio almenaŭ 12 studunuoj en komputillingvistiko, kibernetia pedagogio kaj informadiko aŭ artefarita inteligento. Kaze de celita graduiĝo en la humanistika sekcio apartenas al la tria triono 12 studunuoj pri ĝenerala kaj kompara lingvistiko, humanistika pedagogio kaj retoriko, publikigado, AV-komunikado aŭ historio de lingvoplanado kaj esperantologio. En ambaŭ kazoj do 20 de la 40 necesaj studunuoj estas fiksitaj, sed tiel, ke konsiderinda parto de la interlingvistika instruaĵo jam estas tuŝata. La aliaj 20 ebligu (a) la akiron de bazaj konoj pri helpfakoj, ekzemple pri matematika statistiko, lingvoakustiko, Latina lingvo kaj dua klasika lingvo, (b) al la plidetaligo kaj pliprofundigo de la devigaj enkondukaj kursoj en la interlingvistikon kaj komputillingvistiikon kaj (c) en la koncernajn metateoriojn, precipe en la pedagogion de la planlingvoinstruado. - Pli detala planado (ankaŭ de la 40 preskaŭ libere planeblaj interlingvistiikaj magistriĝcelaj studunuoj postbakalaŭrecaj) okazu en interkonsento kun la aliaj fakuloj kadre de AIS pri la tuta interlingvistika kampo. Temas jam nun pri almenaŭ 18 profesoroj kaj docentoj de AIS, nome (krom la aŭtoroj) Bociort, Carlevaro, Duliĉenko, Janton, Koutny, Kuznecov, Lo Jacomo, Maas, Maxwell, Ölberg, Pennacchietti, Pool, Schulz, Selten, Sherwood kaj pri deko da aliaj apartenantoj de la Internacia Scienca Kolegio de AIS (Barcsay, Behrmann, Duc Goninaz, Lejk, Mattos, McGill, Schubert k.a.). Por la diskutiga celo de ĉi tiu artikolo sufiĉas la konstato, ke la realigo de la instrufako estas realisma projekto, precipe se oni kunkonsideras la eblon akiri studunuojn helpe de aŭdvidaj kaj perkomputilaj kursoj aŭ de kurstekstoj el la medioteko de AIS.

Por la instruado necesas kovri almenaŭ enkonduke ĉiujn kernajn subfakojn de la humanistika kaj kibernetika interlingvistiko kaj oferti pliprofundiĝon en almenaŭ du de ili. Por la esplor- kaj evoluiglaboro ne nur de la studentoj preparantaj siajn sciencajn laboraĵojn sed ankaŭ por la docentoj eblas kaj eĉ indas specialiĝi al limigita projekto prefere pritraktata en internacia kunlaborado. Por doni ekzemplon ni interkonsentis kunlabori en plurlingva fakterminara projekto. Modelo estos certagrade la EK-vortaro de matematikaj terminoj de Hilgers kaj Yashovardhan (1980), sed por la kampoj de klerig- kaj lingvokibernetiko kaj por la oficialaj lingvoj de AIS. Por ebligi fruan partan

uzadon kaj facilan aktualigon temas kerne pri elektronika vortaro. La difinendaj fakvortoj estos kolektataj el la plurlingva fontokolekto "Kybernetische Pädagogik", kies unuaj kvin volumoj (Meder/Schmid, 1973/74) estas kompletigotaj kune kun la projekto. La difinoj de la nocioj okazas en ILo. Unu el la esplorproblemoj de la projekto koncernas la problemon, kiomgrade ILo helpas pro sia aglutineco eviti neologismojn por novaj nocioj, kaj kiomgrade la Latina lingvo estas speciale riĉa provizejo de lingva materialo por utilaj aŭ eĉ neeviteblaj neologismoj. La projekto, por kiu jam dum pluraj jaroj estas plenumataj preparlaboroj kaj kiu laŭ nia difino estas tipe interlingvistika esplor- kaj evoluigprojekto, celas akiri spertojn aplikeblajn ankaŭ por la fakterminologia laboro en aliaj kampoj kaj la empirian kaj heŭristikan bazon por laŭeble ĝenerala teorio.

Literaturo:

Barandovská,V.: Proposita Comeniana quae ad linguam internationalem pertinent, Studia minora universitatis Purkynianae Brunensis,A 27,1979, p.235 - 242

Barandovsk á,V.: Internacia scienca akademio kaj internacia lingvo, GrKG 1990/4,p.155 -158

Blanke,D.: Internationale Plansprachen,Akademie Verlag Berlin, 1985

Duliĉenko,A. D.: Meĵdunarodnie vspomogatelnye jazyki,Valgus Tallin,1990

Frank,H.: Kibernetiko kaj interlingivstiko,en:Lingvokibernetiko, Narr Verlag Tübingen,1982

Frank,H.: Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik, GrKG 1985/2, p. 71 - 82

Frank,H., Yashovardhan, Frank-Böhringer,B.: Lingvokibernetiko, Narr Verlag, Tübingen 1982

Hilgers,R., Yashovardhan (eld.): EG-Wörterbuch mathematischer Begriffe,Leuchtturm Verlag Alsbach,1980

Maxwell,D.: La lingvikaj aplikoj de la kibernetiko,GrKG 1991/3, p.115 - 124

Meder,B.,Schmid,W.(eld.): Kybernetische Pädagogik, Institut für Kybernetik, Paderborn 1973 - 1974

Kuznecov,S.N.: Teoretiĉeskie osnovy interlingvistiky, Izdatelstvo druĵby narodov, 1987

Kuznecov,S.N.: Problemy meĵdunarodnogo vspomagatelnogo jazyka, Nauka, Moskva, 1991

Schulz,R.: Noto pri la scienceco de la internacia lingvo, GrKG 1985/1, p. 31 - 37

Schulz,R.: Notoj pri la aksiomado de la internacia lingvo, GrKG 1985/3, p.130

Stachowiak,H.: Methodologische Bemerkungen zur Axiomatisierung der Interlinguistik, GrKG 1985/2, p.82 - 85

Stachowiak,H.: Gedanken zu einer pragmatischen Theorie der Interlinguistik, GrKG 1986/1, p. 3 - 11

Stachowiak,H.: Interlinguistische Theorie im "non statement view", GrKG 1987/1, p. 11 - 18

Subtena Sektoro de AIS (eld.): Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Paderborn 1988

Wandruszka,M.: Interlinguistik, Umrisse einer neuen Sprachwissenschaft,Piper Verlag München, 1971

Eingegangen am 25. Sept. 1991

Anschrift der Verfasser: Prof.Dr.Helmar Frank, Kleinenberger Weg 16a, D-4790 Paderborn, Mag.Yashovardhan, Ludwigstr. 48, D-4790 Paderborn, Dr.Vera Barandovská, Volgogradská, CS-70400 Ostrava 3

Welche Definition des Begriffs „Interlinguistik“ ist nützlich? (Knapptext)
Bei einer Durchsicht der einschlägigen Fachliteratur läßt sich feststellen, daß für den Begriff „Interlinguistik“ Dutzende von Definitionsvorschlägen vorliegen. Die Autoren definieren die „Interlinguistik“ als Teildisziplin der „Interphilologie“, die sich mit allen existierenden oder möglichen Plansprachen sowie mit den „klassischen“ Sprachen beschäftigt, die in der Vergangenheit als Zwischensprachen hervorgetreten sind (oder diese Rolle noch ausüben).

Which Definition of the Concept “Interlinguistics” is Useful? (summary)
A look at linguistic publications shows that there are dozens of definitions of the concept “interlinguistics” in circulation. The authors define “interlinguistics” as a subdiscipline of “interphilology” which restricts itself to existing and potential planned languages as well as those classical languages which have in the past been in use as “interlanguages” (or are still in use as such).

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Laŭjura sidejo en la Respubliko de San Marino
Prezidanta Sekretariejo:Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, Tel. 0049-64200
Subtena Sektoro:p.a.ADoc.L.Weeser-Krell prof.,Herbramer Weg 9,D-4790 Paderborn & OProf. Mario Grego prof.dott., Casella Postale 116, I-30100 Venezia
Finredaktita: 1991-12-05 Redakcia respondeco:OProf.Dr.H.Frank

Protokolo de la 17-a kunsido de la Senato (la 11-a post la oficialigo de AIS), okazinta dum SUS 10 dimanĉon, 1991-09-08/1691pfR (12:35 - 13:35) en la historia centro de San Marino.

La ĵus de la Ĝenerala Asembleo elektitaj membroj de la nova senato (1992-1995), Frank (D), Minnaja (I), Pennacchietti (I), Quednau (D), Sachs (D), Tyblewski (PL) kaj Wickström (S/A) - kiuj senescepte ĉeestas (kaj krom ili la ĝisnuna senatano OProf Kawamura) - akceptas eklabori plej malfrue la 1- an de januaro 1992 kiel senatanoj.

Ili reelektas OProf Frank kiel prezidanton, OProf Pennacchietti kiel vicprezidanton.

Ili elektas Grégoire Maertens AdAIS (B) trezoristo kun la peto tuj ekdeĵori kiel (kroma) afergvidanto de Akademi- domaro GmbH kaj proponi buĝeton de AIS por 1992. Li ricevu monate 500,- DM por kontribui al vojaĝelspezoj.

Kromajn monate 2.000,- DM oni pagu al sekretario, kiu kune kun la trezoristo profesiigu la administradon de AIS ankaŭ tiel ke kresku la jaraj netaj enspezoj investigeblaj en akademidomon kaj aliajn havaĵojn longtempe valorajn. La trezoristo kaj la sekretario ricevu plusan jaran pagon proporcie al tiaj netaj enspezoj de AIS. La kontrakto, kiu daŭru ĝis la fino de 1995, estu tamen nuligata, kiam eventuale la libera kapitalo de AIS ekmalsuperas la duonon de la kapitalo libere disponebla fine de 1991. Oni elektas kiel sekretarion ADoc Dr.Petr Chrdle (CS).

Oni nomumas la ĝisnunan trezoriston OProf Popovic (Beograd) kaj la ĝisnunan sekretarion OProf Pancer (Zagreb) pro iliaj longjara laboro "honoraj senatanoj". La saman honorigon oni agnoskas al la ĝisnuna senatano OProf Kawamura (Japanio), kiu realigis jam 4 SUS-kursojn, estas ĝis la jarfino dekano de la naturscienca sekcio, fariĝos 80-jara en 1992 kaj laboris dum multaj jaroj efike por la enkonduko de ILo en la sciencojn. La elektitaj senatanoj komencis disdividi inter si la taskojn de la senato kun la celo redukti la taskojn plenumendajn de la prezidanto.

1991-09-10
Protokolis: OProf.Dr.habil.H.Frank (prezidanto)

Protokolo el la fonda kunsido de Ĉeĥa filio de AIS en Prago

Loko: Pedagogia fakultato de Karla Universitato, M. D. Rettigové 4, Praha 2.
Dato: 29-a de aŭgusto 1991.
Ĉeestis: 46 fondaj membroj laŭ la ĉeesto-listo kaj 6 membroj de la preparkomitato. Gastoj: OProf. Helmar Frank, OProf. Osvaldo Sangiorgi, ASci. Ana Vrăjitoru.
Programo:
1.Enkonduko, saluto de la ĉeestantoj kaj prezentado de celoj de la fondota Ĉeĥa filio de AIS - AProf. Vlastimil Novobilský.
2. Informoj pri laboro kaj strukturo de AIS San Marino - OProf. Helmar Frank.
3. Diskuto pri statuto de AIS kaj ĝia aprobo - gvidis AProf. Vlastimil Novobilský.
4. Prezentado de la kandidatoj de la komitato.
5. Elektoj de la komitato de la Ĉeĥa filio de AIS.
6. Diskuto kaj findecido.

Findecido de la fonda kunsido: La fonda kunsido de la Ĉeĥa filio de AIS
1. akceptis informojn de la fonda prezidanto AProf. Novobilský kaj de la prezidanto de AIS San Marino OProf.Frank,
2. unuanime aprobis proponon de la statuto de la Ĉeĥa filio de AIS kaj elektis jenan komitaton: Prezidantaro:AProf. Vlastimil Novobilský, Milan Skalický dr., OProf. Miloš Lánský, AProf. Jitka Brockmeyer, ADoc. Petr Chrdle. Anstataŭantoj: PDoc. Vlastimil Polák, ADoc. Vera Barandovská. Revizoroj: JUDr.Ing. Miroslav Tůma, CSc, JUDr. Marie Kovárová
3. Taskigas la komitaton a) registri la organizon ĉe la koncerna ministerio de la Ĉeĥa respubliko kaj b) formale ŝanĝi statuton laŭ ties eventuala deziro, c) prilabori la agadplanon de la Ĉeĥa filio de AIS.

Protokolis: Barandovská.

Rimarko: Dum la senatkunsido de la 10-a SUS en San Marino estis proponita aranĝi la provan SUS en Prago paralele kun la konferenco „Comenius 1992“ ekde 23-a ĝis la 26-a de marto 1992.

Decido de la AKADEMIA FORUMO en San Marino, 1991-09-04/1691pfR

Diskutinte dum SUS 6, 7, 8 kaj 9 en San Marino kaj Białystok laŭ decido de la Senato kaj de la Ĝenerala Asembleo surbaze de la teksto „Moralo pri Komunikado / Kommunikationsmoral“ (AKTA SANMARINENSIA I/1990, kajero D1, Leuchtturm, Alsbach, ISBN 3-88064-180-3) de OProf.Dr.Frank la problemaron de la etikaj kaj moralaj aspektoj de la nuntempa komunikado, la partoprenantoj de la Forumo pri Akademiaj Rekomendoj proponis dum SUS 10

a) prezenti el la diskutita, vasta kampo nur la sekvantajn tri konkretajn rekomendproponojn al ISK por skriba voĉdonado,

b) provizore interrompi la diskuton pri ĉi tiu temaro kaj

c) transiri kun la aprobo de la senato aŭ de la Ĝenerala Asembleo al la diskuto de la demando: „Kiel utile difini la nocion INTERLINGVISTIKO?“ (fako, kiu en neniu alia universitateca klerigejo de la mondo ludas samaltan relativan rolon kiel ĉe AIS), instigante al prezentado de tekstoj kun kontraŭaj proponoj al la diskutbazo jam prezentita de la AISanoj ADoc Dr.Barandovská, OProf.Dr.habil.Frank kaj ADoc Mag.Yashovardhan (publikigota en la ACTA SANMARINENSIA kaj en GrKG/Humankybernetik).

La tri konkretaj rekomendproponoj, de kiuj la Forumo mem akceptis unuanime la du unuajn kaj kun granda plejmulto kontraŭ du kontraŭvoĉoj la trian, tekstas jene:

1. AIS rekomendas eviti - kaj en internacilingvaj kaj en nacilingvaj sciencaj publikaĵoj - lingvopolucion, kiu konsistus en la ne reliefigita aŭ nenecesa enirigo de esprimoj el aliaj lingvoj. Oni aŭ metu ilin en citilojn, aŭ reliefigu ilin alimaniere grafike, aŭ adaptu ilin al la tekstlingvo, se ne eblas enkonduki trafan esprimon en la tekstlingvo mem.

2. AIS rekomendas en nacilingvaj sciencaj publikaĵoj zorgi ankaŭ pri la iom-post-ioma plibonigo de la internacia scienca komunikado per la uzado de komuna, neŭtrala sciencolingvo. Tiucele la aŭtoroj instistu, ke la revuoj aŭ eldonejoj akceptu kunpresigi resumon en ILo.

3. AIS rekomendas plialtigi la utilecon kaj allogecon de la Internacia Lingvo per tio, ke aŭtoroj de sciencaj tekstoj verkitaj de ili en ILo kaj tiel publikigitaj rezignu pri financaj aŭtoraj rajtoj pri la tekstversio en ILo. Tion oni esprimu per aldono de indiko, ekzemple: DONACO AL LA INTERNACILINGVA KULTURO; KOPIADO KAJ DISVASTIGADO KUN FONTOINDIKO BONVENAJ! - anstataŭ la kutima indiko „Ĉiuj rajtoj rezervitaj!“.

Protokolo de la 8-a kunsido de la Subtena Sektoro okazinta dum la 10-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 10) en San Marino dimanĉe la 1-an de septembro 1991, 15.10-17.00.)

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto, kvorumeco)

Oni petas ke ASci.Catina G.Dazzini, kiu apartenas al ambaŭ sektoroj, iĝu protokolu. Ŝi akceptas. La laborlingvo estas ILo. Prezidas la vicdirektoro OProf.M.Grego. Li anstataŭas ADoc.Dr.L.Weeser-Krell prof., kiu ne povis ĉeesti.

Kunvenis 5 membroj de la subtena sektoro kun 28 delegoj por voĉdoni – kaj 32 pagis al la germana konto. Prof.Frank proponas, ke pri la 7 punktoj de la tagordo oni pritraktu tuj post formalaĵo de p.1-3. kaj p.5. Oni prezentas la liston de italaj subtenaj membroj (15) kaj de la subtenantaj membroj de Respubliko San Marino (20). Prof.Frank indikas 3 pagintajn membrojn el Germanio. Do rajtas voĉdoni (35 + 32) 67 membroj. Ĉeestantaj estas 17, la aliaj rajtas voĉoni pro posedata delego de voĉo de la neĉeestantoj. La prezidanto konstatas kvorumon, sekvas do voĉdonado pri la proponitaj punktoj de la tagordo.

2. Ĝenerala raporto.

Sekvis la ĝenerala raporto.

3. Financa raporto, senŝarĝigo, AKU-kurzo.

Prof.Frank petas, ke oni enketu ĉe la banko por decidi pri AKU-kurzo por la kotizo de la venonta jaro, ĉar en la tempointervalo de la 20-a ĝis la 24-a de aŭgusto 1990 kontraŭ 1 DM oni ricevis inter 737 kaj 747 LIT kaj ne

eblas senkonteste konstati, ke germana marko fariĝis pli stabila ol liro, kiu ja estis pli stabila en la antaŭa jaro. Pro tio, ke oni ricevas antaŭe ankoraŭ 750 LIT por unu IRK necesas kaj sufiĉas 100 IRK por ricevi 75000 LIT. Tial konforme al art.4.1 de la mastrumadregularo la Senato, per iniciato de la Trezoristo, proponis skribe kaj la asembleo de la subtena sektoro aprobis post iom da diskuto, ke la valoro de la AKU ankaŭ en 1992 estu 75000 LIT aŭ 100.- DM. Oni tamen konsciiĝis, ke ekde post venontjare, pro la plua altiĝo de la poŝttarifo ankaŭ en Italio, la valoro de AKU plialtiĝu.

4. Decidoj pri proponij skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn anticipe.

Neniu propono alvenis.

5. Kromaj tagordaj punktoj - Nenia aldonenda.

6. Elekto de la nova estraro por la jaroj 1992-1995.

Oni elektis sen kontraŭvoĉoj kun unu sindeteno de la protokolanto la jenan laŭstatutan 5-kapan estraron :

1. ADoc.Dr.Lothar Weeser-Krell prof.
2. ADoc.dr.h.c.Günter Klemm
3. OProf.Mario Grego dr
4. ADoc.Dr.Werner Bormann
5. ASci.Bac.h.c.Miriam Michelotti

al kiu aldoniĝu kiel Trezoristino Honora Direktorino Marina Michelotti. Sekretario de la subtena sektoro estu ISKano Dario Besseghini.

Krome oni elektis Romeo Pagliarani membro de la itallingva subkomitato. (Elekto de ne-itallingva subkomitato ne okazis.) La estraro elektu la direktoron kaj la vicdirektoron el inter la estraranoj de la itallingva subkomitato:

1. Romea Balsimelli
2. Catina Giulia Dazzini
3. Rino Fantini
4. Piera Federico Raffo
5. Serenella Giacchino Teruzzi
6. Carla Monetti
7. Romeo Pagliarani

7. Diversaĵoj - Nenio priparolenda.

Protokolanto
ASci.Catina G.Dazzini

Protokolo de la 18-a kunsido de la Senato (la 12-a post la oficialigo de AIS)
okazinta dum la unua studadsesio en la Rumania filio de AIS (provsesio por estonta tiea SUS) merkredon, 1991-10-09/1691 pfR (21:00 - 23:15) en la universitato de Sibiu/Hermannstadt.

1. (Formalaĵoj; superrigarda raporto)

La senatkunsidon ĉeestis la dejorantaj senatanoj Frank kaj Popovič. Forestis la senatanoj Chen, Kawamura, Mužić, Pancer, Pennacchietti, Quednau kaj Tyblewski. Uzis sian partoprenrajton (la apartenecon al la „Granda Senato“) dekano OProf. Holdgrün kaj - de la novaj senatanoj elektitaj por 1992-1995 - OProf. Sachs. ASci. Mag. Joanna Lewoc de la Prezidanta Sekretariejo partoprenis kiel gasto. Spite la diversajn delegitajn voĉdon-rajtojn ne estis dubo, ke la kunsido ne estas kvoruma por decidi kun tuja efiko pri ne urĝaj demandoj.

La prezidanto informas pri la renkontiĝo kun la slovenia ministro pri klerigo kaj sporto, prof.d-ro Peter Vencelj, kaj reprezentantoj de la du sloveniaj universitatnivelaj klerigejoj (Ljubljana kaj Maribor) la antaŭan sabaton, 1991-10-06, 7:00 - 9:00 h, el kiu probable rezultiĝos AIS-filio en Ljubljana. La senato esperas, ke interkonsento laŭ la Rumania modelo estos aprobebla de la Ĝenerala Asembleo jam dum la prov-SUS en Praha.

2. (Honorigoj)

La alvokoj okazu kiel proponite de la sekcikunsidoj okazintaj la tagon antaŭe:

Por sekcio 2 (humanistiko) la prezidanto alvoku kiel ASci. s-inon Bac.sc.hum. LI Renzhi (CHN) kaj s-inon Mihaela MOGA prof. (RO), kaj kiel Adoc. s-inon ASci. Mag.sc.hum. Ana VRĂJITORU (RO), kaj (provizore por la jaroj 1991 - 1993 kun propono dum tiu tempo adapte adoptigi sian magistrecan rangon) s-inon ASci. Catina DAZZINI (I).

Por sekcio 3 (struktursciencoj): Oni alvoku ASci. Aleksandr MILNER (SU) kaj Benedito CASTRUCCI prof. (BR) kie ADoc.

Por sekcio 5 (natursciencoj):estu alvokita kiel ASci. ISK Moise ŢUŢUREA prof.

3. (Instruado kaj ekzamenado)

Tuj aprobante la proponojn de la ĉeestantaj membroj de la ekzamenoficejo oni petas senatanon OProf. Popovič kiel ties membro gvidi la ekzamekomitaton starigitan por la magistriĝ-ekzamenoj dum la provsesio. Al la ko-

mitato apartenu kiel persone ĉeestantaj anoj krome la efektivaj membroj profesoroj Frank, Holdgrün kaj Sachs kaj la adjunktoj Dazzini, Mag.Lewoc, Mag.h.c.Michelotti, Moga, Preotu kaj Mag.Vrăjitoru. La dekunua komitatano estu la ekspertizisto de la magistriĝtezo, se la ekspertizo bonorde ekzistas kaj se la magistriĝtezo estas jam laŭregulare akceptebla; alikaze la foresta fakulino ADoc.Dr. Vera Barandovská aldonu sian prijuĝon surbaze de la dokumentoj.
La kandidatiĝo por adapta adopto de ASci. Giacchino estas aprobita. Kun unu sindeteno la senato aprobas la rifuzon de la tuja kandidatiĝo de ASci. Li pro tro malgranda ŝanco de sukceso, formalaj mankoj konstateblaj surbaze de la ekzamenregularo kaj verkaĵo ankaŭ enhave ne konforma al magistriĝtezo.

4. (Sciencaj konferencoj)
Kun bedaŭro la senato ekscias ke la realigo de la prov- SUS en Praha pro lokaj obstakloj ne eblos jam dum la Comenius-konferenco sed nur senpere sekve al ĝi. Oni decidas, ke la sesio tamen okazu kaj estu konsiderata kiel finance apartigita „daŭrigo de la Comenius-konferenco". La malfermo okazu vendredon vespere, la 27-an de marto. Sabaton kaj dimanĉon okazu preparaj lingvokursoj, kunsidoj de senato kaj de la ekzamen-oficejo, asembleo de la subtena sektoro kaj ankaŭ la kunsidoj de la sekcioj. De lundo matene ĝis vendredo okazu la kursoj kaj konferencoj, vendrede krome la ekzamenoj kaj - vespere - la fermo. La sabato, 4-a de aprilo estu la tago de ekskursoj kaj de la hejmenveturado, tiel ke la oficiala daŭro de la prov-sesio estu de la 27-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1991.

5. (Publikigado)
Nenia decido

6. (Kunlaborprojektoj)
Nenia decido

7. (Organiza stabiligo)
Kun bedaŭro oni ekscias, ke flanke de la Internacia Akademio Comenius la ofertita kunigo ne estas dezirata.
La oferto al ISAE kunigi kun ISK restu valida ĝis la Universala Kongreso en Wien 1992; la prezidanto sekvu bontempe la inviton klarigi la proponon per artikolo en la Scienca Revuo de ISAE. Kun ĝojo oni aŭdas, ke la prezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT), prof.Pauli, petis la prezidanton de AIS dum la Universala Kongreso prepari la kunigon de FAT kun la filozofia sekcio de ISK.
Oni akceptas la proponon nuligi la fakaron 6.4 kaj redukti al nur tri ankaŭ la nombron de la fakaroj de la filozofia sekcio laŭ interkonsento trovota inter la prezidanto, dekano OProf. Bociort kaj vicdekano AProf. Strombach.
Oni ankoraŭ atendas el San Marino la efektivigon aŭ konfirmon de la promesoj dum SUS 10 faritaj de ministrino Fausta Morganti (vd. la protokolon de la 16a senatkunsido).
Rilate la skriban aprobon de la ĉeĥa ministro Vopenka, la ministerian aprobon de legitima filio en Moskva, la decidon pri kontaktuniversitato laŭ propono de la bulgara ministerio cele starigon de tiea AIS-filio kaj rilate reaktiviĝon de la ŝvebanta projekto starigi legitiman filion en Hungario la senato esperas progresojn en la koncernaj landoj por laŭeble proklami ankaŭ tion okaze de la unua AIS-sesio en Praha se ne jam jarfine dum la unua Rusa AIS-sesio.

8. (Akademiaj Rekomendoj)
Oni decidis taskigi la ges-ojn ADoc. Mag.sc. hum. Ana Vrăjitoru, Asci. Mihaela Moga kaj ISK Joachim Kockmann dipl.-math. triope gvidi la samtempe kun la senatkunsido okazantan Akademian Forumon kaj tie prezenti kaj diskutigi la rezultojn de la ĝisnuna diskuto pri „Komunikada Moralo", kiu estu diskonigita per la jarfina cirkulero de la prezidanto kaj en la oficialaj sciigoj de AIS.

9. (Diversaĵoj)
Senatano OProf. Popovič bindigis kaj kunportis la kolekton de siaj sciencaj (plejgrandparte matematikaj) publikaĵoj en tri volumoj, kiujn li transdonis kiel donaco al AIS. (Oni provizore konfidas la unikan verkaron al la Rumania filio pere de la vicrektoro de la Universitato Sibiu, ASci. Ţuţurea.) Spite la oftan hezitemon kaj eĉ kontraŭstaron de redaktoroj li sukcesis publikigi ĉ. la duonon de sia scienca verkaro en ILo kaj aldoni al la nacilingvaj publikaĵoj resumojn en ILo. Dum la ferma solenaĵo estu reliefigata kiel imitinda modelo ĉi tiu multjardeka kontribuo al la progreso kaj de la scienco kaj de la scienca komunikado. Senatano Popovič klopodos ankaŭ iri al Praha por tie kiel Honora Senatano transdoni ankaŭ la kolekton de la de li redaktitaj numeroj de la Scienca Revuo al AIS.

1991-10-27/1691pfR

Protokolis: *OProf.Dr.habil.H.Frank (prezidanto)*

Protokolo de la 12-a Ĝenerala Asembleo (la 9-a post la oficialigo de AIS),
okazinta dimanĉon, 1991-09-08/1691 pfR, 9:15-11:30, en salono Boulanger en la Scuola Secondaria Superiore en San Marino (RSM).

1. Formalaĵoj
La prezidanto, OProf. Frank, malfermas la asembleon. Ĉiuj ĉeestantoj havas ĉeestrajton. La asembleo unuanime akceptas PDoc. Fößmeier kiel protokolanton kaj la anoncitan tagordon. Ĉeestas 12 efektivaj membroj, kiuj reprezentas 87 el entute 94 efektivaj membroj. La Asembleo do estas kvoruma.

2. Ĝenerale raporto de la Senato
La prezidanto referencas al siaj raportoj dum la solenaj inaŭguro kaj fermo.

3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto
Pro la situacio en Jugoslavio, trezoristo OProf. Popović ne povis veni, sed nur sendis raporton. La revizoroj havis okazon kontroli tiun raporton kaj ne trovis ion kritikindan.
Propono de OProf. Minnaja, senŝarĝigi la Senaton por la pasinta jaro, estas unuanime akceptita.
Buĝeto ankoraŭ ne ekzistas; OProf. Frank proponas, ke la elektota nova Senato proponu buĝeton al la ĜA en Sibiu (RO). La Asembleo akceptas unuanime.

4. Decidoj
La prezidanto proponas nome de la Senato:
- la ĜA aprobu la dungon de unu aŭ du administranto/j, laŭ la cirkulero de 1991-08-10;
- la salajro de administranto/j dependu de liaj enspezigoj por AIS kaj estu inter 2,5 kaj 10 AKU monate;
- la dungo okazu por 4 jaroj, sed maksimume ĝis forkonsumo de la duona kapitalo de AIS, kaj kun 6-monata provtempo.
Ĉiesvoĉe akceptita.
La prezidanto dankas pro la laboro de la komitato pri regularoj (ADoc. Angstl, ASci. Ender, PDoc. Fößmeier) kaj proponas, ke la nova Senato studu ties raporton kaj post unu jaro prezentu prilaboritan regularon.
Plia propono koncernas la konstaton de advokato Sbraccia SMdAIS, ke la Statuto ne mencias la rajton starigi filiojn; la propono tekstas:
- La Senato modifu, se necese, ankaŭ la Statuton por adapti ĝin al la regularo.
Plia propono pri la alvoko de plenrajtaj docentoj: Al la ekzamen-regularo aldoniĝu nova alineo:
- EK 34.5 Pri la docentiĝtezo eblas rezigni, se la kandidato tre bone regas ILon skribe kaj parole, estas doktoro de AIS, aĝas minimume 50 jarojn kaj publikigis sciencajn verkojn, egalvalorajn al docentiĝtezo, en oficialaj lingvoj de AIS, inter ili plurajn en ILo („akumula" tezo).
Ĉiuj tri proponoj estas akceptitaj unuanime.

5. Kromaj tagordaj punktoj
Ne estas.

6. Elekto de la Senato
La Asembleo unuanime akceptas proponon de la malnova Senato, ke la nova Senato komence havu sep anojn.
Senatano OProf. Kawamura, kiu ne plu kandidatas, proponas la profesorojn Frank, Minnaja, Pennacchietti, Quednau, Sachs, Tyblewski kaj Wickström kiel Senatanojn. La Asembleo elektas ilin en unuopaj voĉdonadoj, ĉiujn unuanime.
La Senato krome proponas:
- prokrasti la elekton de anstataŭantoj ĝis la sekva ĜA;
- ke la titolo de „vic-Senatano" estu laŭ-okaze komisie donebla de la Senato al reprezentantoj de AIS;
- ke la eksaj Senatanoj OProf. Pancer kaj OProf. Popović estu rekomendataj al la Senato por elekto kiel Honoraj Senatanoj, pro sia meritplena laboro kiel sekretario kaj trezoristo;
OProf. Tyblewski proponas fari la saman rekomendon pri eks-Senatano OProf. Kawamura, pro ties multjara laborado kaj kontribuoj al pluraj SUS-oj.
Ĉiuj proponoj ests unuanime akceptitaj.
Ĉar revizoro Argentino SMdAIS ne plu kandidatas, la prezidanto proponas s-inon Klemm SMdAIS kaj s-inon Sachs kiel revizorojn; anstataŭanton oni elektu dum alia ĜA. Unuanime akceptita.

7. Diversaĵoj
Post instigo al kurs-proponoj por la prov-SUS en Sibiu kaj invito al la rusa AIS-sesio jarfina, oni sciigas ke la konferenco en Prago (CS), 92-03-23/27, okazos kiel prov-SUS. Stud-sesio en Krynica (PL) okazos en la dua semajno de majo 1992, SUS 11 okazos en San Marino dum 1992-08-29/09-06.

OProf.Dr.H.Frank prezidanto *PDoc.Dr.R. Fößmeier protokolanto*

Protokolo de la 13a Ĝenerala Asembleo (la 10a post la oficiligo de AIS)

okazinta dimanĉon, 1991-10-10/1691pfR, 20h30-22h30 en la Salono Boulanger, Universitato de Sibiu/Hermannstadt (RO) okaze de la unua studadsesio de AIS en sia Rumania filio.

1. Formalaĵoj

La prezidanto konstatas, ke ĉiuj personoj en la salono estas minimume ISKanoj, do posedas ĉeestrajton. Li atentigas, ke nur efektivaj membroj rajtas voĉdoni. Neniu pridubas la kvorumecon de la asembleo. Kiel protokolanton oni elektas OProf. Holdgrün (D). La protokolo de la lasta Ĝenerala Asembleo ankoraŭ ne estas publikigita, do nekonata, tial oni ne povas aprobi ĝin. La tagordon la prezidanto precizigas jene: sub punktoj 4 kaj 5 okazu decidoj pri la filio de AIS en Rumanio kaj pri la apelacioj de la kandidatoj Li (CHN) kaj Bürschel (D) rilate al ekzamenoj. La tagorda punkto 6 (elektoj de anstataŭantoj de senatanoj) forfalas. La tagordo estas akceptita.

2. Generala raporto de la Senato

La prezidanto raportas

a) pri Prago: Tie okazos 1992-03-23/27 la kongreso Comenius pro ties jubilea jaro. Samtempe estu tie la unua ProvSUS de AIS, kiu pro loĝejaj malfacilaĵoj bedaŭrinde nur povas komenciĝi la 27an de marto. (Oni oficiale atendas por la kongreso 2000 partoprenontojn). La senato decidis, ke la malfermo de la sesio okazu je vendredo, 1992-03-27, 20.00 h. Sabate kaj dimanĉe estu lingvokursoj kaj kunsidoj de la senato, sekcioj ekzamenoficejo, Subtena Sektoro kaj Ĝenerala Asemblejo. Kursoj, prelegoj kaj prelegserioj realiĝu de la 30a de marto ĝis la 3a de aprilo. Je ĉi tiu lasta tago oni fermos la sesion. En Prago mankas ankoraŭ skriba aprobo de la ministro rilate al registro de la titol-agnoskoj.

b) pri Ljubljano: Lastan sabaton je la sepa matene la prezidanto kunvenis kun la ministro kaj du delegitoj de la sloveniaj universitatoj den Maribor kaj Ljubljano. En tiuj de universitatoj oni elektos komitaton por adapti al Slovenio la Rumanian modelon pri filio de AIS. Poste necesas la aprobo de la ministro; ĝi estas tre verŝajna.

c) pri Moskvo: Momente je la jarfino tie oni nur planas studadsesion (1991-12-29 ĝis 1992-01-04 kun daŭrigo en Petrogrado ĝis la 8a de januaro). Ĉu eblas okazigi tie ankaŭ SUS-on, oni ekscios post proksimume monato.

d) pri la registro en Sibiu: Personoj, kiuj akiris sciencistan gradon en la kadro de AIS povas transdoni persone al la rektoro de la universitato en Sibiu la koncernajn dokumentojn, por ke oni oficiale registru la akiritajn titolojn en Rumanio. Por kelkaj personoj tio okazas jam nun dum ĉi tiu prov-SUS.

e) pri Timişoara: Laŭ la peto de kolego OProf. Bociort la prezidanto sabate renkontiĝos kun la kvar rektoroj de la tieaj universitatoj por diskuti pri eventuala filio de AIS en Timişoara. La senato opinias, ke ne estas logike starigi du filiojn de AIS en Rumanio, kaj ne volas endanĝerigi tion kion AIS jam atingis en Sibiu. Oni demandos, kiel en Timişoara oni povas ekhavi studentojn.

f) pri San Marino: Kelkaj personoj en la salono plendas, ke en San Marino ne estas sufiĉe da studentoj, oni nepre devas plibonigi tie la varbadon. Ankaŭ necesas pli akurata planado: nepre necesas ekscii la detalojn pri la ejo en San Marino je 5 monatoj antaŭ la sesio.

3. Financa raporto

Nenio estas direnda.

4. Decido pri filio en Rumanio

La prezidanto petas pri decido rilate al eventuala filio en Timişoara. Tie estas nur unu efektiva membro de AIS, kontraŭe en Sibiu jam ekzistas 25 studentoj de AIS, kiuj estas samtempe studentoj de la universitato, kaj ĉi prov-SUS montras, ke la kondiĉoj en Sibiu estas tre favoraj. La Asembleo unuanime proponas: La registro kaj konkreta oficejo de la filio de AIS en Rumanio nepre restu en Sibiu, oni ne detruu, kion oni jam akiris. Tio ne signifas, ke en Timişoara nenio okazu de AIS; tie povas esti speco de subfilio, kie AIS povas oferti sesiojn. Oni nepre atentu, ke en ĉiu lando estu nur unu filio de AIS, eventuale kun pluraj konkretaj oficejoj.

5. Decidoj pri apelacioj

a) Venis telekso de la kandidato Bürschel, kiu dum SUS 2 provis adapte adopti sian magistrecon, sed ankoraŭ ne ricevis la konstaton laŭ art. 4.2 de la ekzamenregularo, ĉar li ne plenumis ĝis nun ĉiujn ekzamenajn detalojn kiujn

postulas la regularo aplikita ekde SUS 3. Li plendas, ke por li ne eblis liveri ĉiujn aferojn ĝis la difinita limdato (decembro 1990), ĉar pro la neatendita morto de la membro de la ekzamenoficejo OProf. Schick ne eblis regula traktado de liaj problemoj. Li apelacias al la Ĝenrala Asembleo, ke oni permesu al li prokraston ĝis nova difinenda limdato. La Asembleo unuanime aprobas tion kaj decidas, ke la nova limdato por kandidato Bürschel estu la 30a de Septembro 1992, post la SUS 11 en San Marino. Tiu decido validu ankaŭ por aliaj kandidatoj en simila situacio, kiuj ekzameniĝis dum SUS 2.

b) Bac. Li Renzhi (CHN) provis kandidatiĝi por magistro, kion la ekzamenoficejo rifuzis pro manko de ekspertizo kaj kelkaj aliaj formalaĵoj. La senato konfirmis tiun decidon. Bac. Li ne konsentas kaj atentigas, ke al la loka ekzamenoficejo ne apartenas fakuloj el la koncerna sekcio. Ŝi apelacias al la Ĝenerala Asembleo ja ebligi al ŝi kandidatiĝon. Subtenas tiun apelacion ASci. Dazzini kaj ankaŭ ASci.Mag.h.c. Marina Michelotti. La Asembleo akceptas la apelacion. Bac. Li do povas prezentiĝi al ekzameno, sed ŝi dum du jaroj devas nepre kompletigi la necesajn aferojn, kiuj ankoraŭ mankas. Grava manko estas ekzemple, ke la magistriĝtezo ne posedas la laŭ la reguloj necesan amplekson.

6. Diversaĵoj

La prezidanto laŭtlegas telegramon de kolego OProf. Tyblewski (PL), per kiu ĉi tiu anoncas, ke li ne povas veni pro kandidatiĝo al la parlamento. La prezidanto atentigas pri kelkaj datoj je vendredo: la ekzamenoj okazos inter la 14a kaj la 16a horo. La solena fermo jam estos je 20.00 h. Post la fermo oni planas finan feston en la hotelo Continental.

OProf.Dr.habil.H.Frank (Prezidanto) — OProf.H.S.Holdgün (Protokolanto)

> La Akademio Internacia de la Sciencoj funebras pri la perakcidenta morto de sia kunfondintino kaj estraranino de la Subtena Sektoro
> Bac.sc.morph.h.c. Miriam MICHELOTTI
> 1920-09-12 - 1991-11-23

Unua Ĉeĥa Studadsesio de AIS daŭrigos la Comenius-Kongreson '92

Karla Universitato Praha kaj Comenius-Universitato Bratislava organizas en kunlaboro kun UNESCO, kun Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj parte (por la sekcio 3) ankaŭ kun AIS Internacian Konferencon „La heredaĵo de Comenius kaj la eduko de la homaro por la 21a jarcento". La konferencon aŭspicos la prezidanto de ĈSFR, Václav Havel; konferencestro estos la rektoro de la Karla Universitato, prof. d-ro Radim Palouš. La konferenco komenciĝos lundon, la 23an de marto 1992, 14a horo en la kulturpalaco centre en Praha (5. kvetna 45), kaj finos vendredon, la 27-an de marto.

La detala programo, kiun la aliĝintoj ricevos ekde januaro 1992, enhavos la nomojn kaj temojn de la prelegontoj en la starigitaj sep sekcioj:

Sekcio 1. Edukado por la 21a jarcento
Sekcio 2. La evoluo de la infana personeco kaj la rajtoj de la infano.
Sekcio 3: Instruperiloj kadre de informteknologio
Sekcio 4: Comenius pri fruinfanaĝa edukado kaj lia heredaĵo en la nuntempo.
Sekcio 5: Comenius kaj la graveco de instruado pri lingvo kaj literaturo
Sekcio 6: J.A.Comenius kaj "Res Humanae".
Sekcio 7: J.A.Comenius kaj lia heredaĵo en ekleziaj aktivecoj.

La kotizo - 150 US$ - inkluzivas la ricevon de la kongres-aktoj sed ne la restadkostojn. -

Senpere post la internacia Comenius-konferenco okazigos AIS sian provsesion cele starigon de la Ĉeĥa filio de AIS, al kiu Karla Universitato - konforme al la interkonsento subskribita kun rektoro prof.d-ro Palouš 1991-05-24 - intertempe jam havigis buroon kadre de la klerigteknologia katedro de la Pedagogia Fakultato (M.D.Retigové 4, CS-110 00 Praha, telefaks-numero 0042-2-290225). La Pedagogia Fakultato disponigos idealajn kongreslokojn en sia branĉo Brandýs nad Labem / Stará Boleslav, ĝemelurbo situanta ambaŭflanke de la rivero Labe/Elbe, dudek kilometrojn nordoriente de Praha. De la urbocentro de Praha ĝi estas facile atingebla ŝanĝante de la metroo je haltejo Na Palmovce al buso kaj tiam veturante ĝis la antaŭlasta haltejo Brandýs n.L. por la kongresejo kaj manĝejo (Pedagogická

Fakulta Univerzity Karlovy, Pobočka Brandýs n.L., Královická 915, CS-25001 Brandýs n.L.) aŭ ĝis la finhaltejo Stará Boleslav por la loĝdomo (Houšťka). Piede oni antingas la kongresejon de la loĝdomo dum 20 minutoj.

La solena malfermo okazos vendredon, la 27an de marto 1991, 20 h en la granda salono de la modesta sed kontentiga loĝdomo Houšťka en Stará Boleslav, kie estas jam rezervitaj sufiĉe da ĉambroj (kun matenmanĝo) por (laŭdezire) po unu, du aŭ pli da partoprenontoj de la 27a de marto ĝis la sabato 4-a de aprilo. (Plilongigo ĝis dimanĉo eblas samtempe kun la aliĝo je krompago de nur 0,1 AKU = 10,- DM). Dum la sabato kaj dimanĉo okazos ILo-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, kunsidoj de la senato, de la ekzamenoficejo, de la Subtena, Arta kaj Teknika Sektoroj kaj de la sekcioj kaj fakaroj de la Scienca Sektoro. Estos krome organizita urborigardado de Praha kun klarigoj en ILo kaj laŭbezone en aliaj oficialaj lingvoj de AIS.

La kursa kaj konferenca parto en la ses seckioj (kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj, morfosciencoj) okazos kune kun arta kadra programo de lundo, 3-a de marto, ĝis (finaj ekzamenoj:) vendredo, 3-a de marto. Ĝenerala Asembleo okazos vendredon posttagmeze, la solena fermo vespere je la 20-a h. Ni havos po unu salonon je 20 personoj por ĉiu sekcio kaj pli grandan salonon por la prezentado de videokursoj. Tagmanĝo kaj vespermanĝo okazos en la kongresejo mem, kiu ankaŭ disponas pri bufedo por kafumado (funkcianta ĝis la 15a h).

ISKanoj estas petataj sendi plej malfrue ĝis 15a de januaro proponojn de prelegoj aŭ kursoj (pro la fakto, ke temos pri prov-SUS, ankaŭ kursproponoj de asociitaj docentoj estas bonvenaj) nepre al la koncerna dekano (vd. adresliston sube) kun kopio al la Prezidanta Sekretariejo en Paderborn (Kleinenberger Weg 16) kaj la AIS-buroo en Praha (Rettigové 4). Kontribuoj al la kadra programo aŭ al programoj de la Arta kaj Teknika sektoroj estu sendataj al la Prezidanta Sekretariejo kun kopio al la AIS-filio. En ĉiu kazo necesas samtempe aliĝi - per aliĝilo aŭ neformala letero aŭ poŝtkarto; la aliĝkotizo estas por ne-ĉeĥoj 0,3 AKU = 30,- DM, kiuj estos post la studadsesio repagataj al programkonforme prelegintoj sur la servobonhavon. Ne estos enmetata en la programon preleg- aŭ kurspropono de iu ajn, kiu nek ĝiras kune kun la aliĝo almenaŭ 30,- DM kiel kotizon al nia poŝtĉeka konto 2051- 305 poŝtĝiro-oficejo Hannover) nek povas disponigi per sia servobonhavo 0,3 AKU. Post la 15a de januaro ĝis la komenco de la scienca programo ankoraŭ eblas anonci 10-minutajn koncizpreloegojn - kaze ke ankoraŭ estas libera tempo je dispono - ĉe la dekanoj kiuj zorgos pri afiŝado de la al li havigendaj anoncfolioj.

Post la 15a de februaro 1992 la aliĝkosto estos 0,5 AKU kaj povas esti pagata ankaŭ surloke. (Ĉeĥoj estos per AIS Ĉeĥio kolektive aligataj - informon donas la AIS-buroo Praha.) Aliĝo eblas kaj por memzorgantoj (estas disponeblaj ankaŭ hoteloj) kaj kune kun antaŭpago por loĝado kaj manĝado en Brandýs kaj Stará Boleslav. La komplete antaŭpagenda prezo por tiuj restadkostoj por la 8 tranoktoj kaj la manĝkuponoj estas 2,4 AKU = 240,- DM; partoprenantoj el reformeŭropaj landoj kaj landoj en simila ekonomia situacio ricevas 80%an rabaton (ili pagu dekomence nur 0,48 AKU), laŭprograme prelegintoj kaj kursgvidintoj ricevos post la studadsesio 40%n sur siajn servobonhavojn, Ĉeĥoj ricevos pere de la AIS-oficejo en Praha specialajn kondiĉojn. Kaze de aliĝo post la 15a de januaro ni ne plu povas garantii, ke ankoraŭ estas havebla ĉambro en la loĝdomo Houšťka!

Speciala celo de la prov-SUS estas malfermi la registron de la sciencistaj gradoj kaj titoloj agnoskitaj de AIS kaj validaj tiel ankaŭ en la Ĉeĥa respubliko. Estas afable petataj speciale ankaŭ ĉiuj profesoroj, docentoj, adjunktoj kaj liberaj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS helpi al la pliperfektigo kaj al la reputacio de nia sistemo per adapta adoptigo de siaj ekster AIS akiritaj sciencistaj gradoj. Postulu kandidatleteron de la Prezidanta Sekretariejo kaj resendu ĝin antaŭ la fino de la januaro (limdato por ĉiuj kandidatiĝoj dum la prov-SUS). Por la ekzamenoj kaj la atestoj de studunuoj dum la prov-SUS la partoprenantoj el reformeŭropaj kaj ekonomie kompareblaj landoj ricevos 80%an rabaton! La limdato por kandidatiĝi en San Marino dum SUS 11 estas la 3-a de aprilo 1992. Rabato por partoprenantoj el reformeŭropaj landoj en San Marino ne ekzistas.

DEKANOJ de la sekcioj:

Sekcio 1 *Kibernetiko*
OProf.Bengt-Arne WICKSTRÖM dr.
Institut für Volkswirtschaftslehre
Johannes-Kepler-Universität Linz
A-4040 Linz-Auhof

Sekcio 2 *Humanistiko*
OProf.Fabrizio PENNACCHIETTI dr.
Via delle Rosine 10, I-10123 Torino

Sekcio 3 *Strukturscienco j*
OProf.Horst S.HOLDGRÜN dr.habil.
Greifswalder Str. 7, D-W-3406 Bovenden

Sekcio 4 *Filozofio*
OProf.Ignat BOCIORT
Bd.Eroilor nr.7/D, RO-1900 Timişoara

Sekcio 5 *Natursciencoj*
OProf.Rüdiger SACHS dr.
Grenzknick 7, D-W-2000 Hamburg 70

Sekcio 6 *Morfosciencoj*
OProf.Dr.habil.Tyburcjusz TYBLEWSKI
ul.Bartka Zwycięzcy 11/1
PL-58-500 Jelenia Góra

Vojo al starigo de AIS-filio en Praha malfermita.

La ministro pri klerigo, junularo kaj sporto de la Ĉeĥa respubliko, prof. d-ro Petr Vopěnka, ricevinte la 28an de junio 1991 - en persona interparolo kun la prezidanto de AIS kaj la estraranoj de la Ĉeĥa AIS-asocio OProf. Lánský kaj AProf. Novobilsky - klarigon pri la interkonsento subskribita inter AIS kaj la Karla Universitato Praha 1991-05-24 (vd. la oficialajn sciigojn de AIS en GrKG/Humankybernetik 32(1991),2), aprobis ankaŭ skribe ĉi tiun interkonsenton per la jena letero:

Ministr školství, mládeže a tělovýchovy — *V Praze dne září 1991*
České republiky — *č.j. 20.235/91, 321*

Vážení pánové,

s velkým potěšením jsem přijal zprávu o uzavření dohody mezi Universitou Karlovou v Praze a Mezinárodní akademií věd se sídlem v San Marinu o vzájemné spolupráci v oblasti výuky, podepsanou dne 24.5.1991.

Tato dohoda je konkrétním příspěvkem k úmluvě, která byla krátce předtím uzavřena mezi ČSFR a Rpublikou San Marino na úrovni ministerstev zahraničních věcí v oblasti kulturních, školských a vědeckých styku

Věřím, že postupem času se vytvoří další možnosti, aby se do takovéto spolupráce zapojily i ostatní vysoké školy v České republice.

S přátelským pozdravem

(subskribis:)*Petr Vopěnka*

(Traduko:)
Ministro pri klerigo, junularo kaj sporto — Prago, septembro 1991
de la Ĉeĥa respubliko — signo 20.235/91, 321

Estimataj Sinjoroj,

kun granda plezuro mi ricevis la informon pri la starigo de kontrakto inter Karla Universitato en Praha kaj Akademio Internacia de la Sciencoj kun sidejo en San Marino pri kunlaborado en la kampo de instruado subskribita 24.5.1991.

Tiu kontrakto estas konkreta kontribuo al la interkonsento, kiu iomete pli frue estis subskribita inter ĈSFR kaj la Respubliko de San Marino sur la nivelo de la ministerioj pri eksterlandaj aferoj por la kampo kultura, kleriga kaj scienca.

Mi opinias, ke iom post iom ekestos pluaj ebloj por enplekti en ĉi tiun kunlaboradon ankaŭ aliajn altlernejojn en la Ĉeĥa respubliko.

Kun afabla saluto

Petr Vopěnka

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,

(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,

(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj

(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 7-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 7) okazinta en San Marino

la sciencistajn gradojn

„Baccalaureatus scientiarum humanarum (Bac.sc.hum.)“ – t.e. bakalaŭro pri humanistiko – al

LI Renzhi el Paderborn (D) *1965-04-27 en Tong hua (CHN), en la fako „planlingvoinstruado“ (dokumento 1690 B 001)

„Magister scientiarum cyberneticarum (Mag.sc.cyb.)“ – t.e. magistro pri kibernetiko – al

Stephan OTTO el Duisburg (D) *1958-07-02 en Berlin (D), en la fako „komunikadscienco“ (dokumento 1690 M 001)

Wolfgang BERINGER el Gütersloh (D) *1952-05-31 en Mannheim (D), en la fako „komunikadscienco“ (dokumento 1690 M 002)

„Magister scientiarum morphologicarum (Mag.sc.morph.)“ – t.e. magistro pri morfosciencoj – al

Johann PACHTER el Sigmaringen (D) *1949-12-03 en Stillersfeld (D), en la fako „forstscienco“ (dokumento 1690 M 003)

„Doctor scientiarum naturalium (Dr.sc.nat.)“ – t.e. doktoro pri natursciencoj – al

Petr CHRDLE el Praha (CS) *1946-03-12 en České Budějovice (CS), en la fako „elektroniko“ (dokumento 1690 D 001)

„Doctor scientiarum cyberneticarum habilitatus (Dr.sc.cyb.habil.)“ – t.e. doktoro habilita pri kibernetiko – al

Vlastimil POLÁK el Soest (D) *1944-03-16 en Říčany (CS), en la fako „kibernetika pedagogio“ (dokumento 1690 H 001)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1990-09-09/1690pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la Respubliko de San Marino la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo enskribigis la supre surlistigitajn 6 agnoskojn la 1990-09-09/1690pfR en la „REGISTRON de eksterlandanoj portantaj akademiajn titolojn kies grado estas latinforme agnoskata en San Marino post kiam ili sukcese plenumis suplementajn studojn kaj sukcese trapasis ekzamenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino“ (n-roj 77–82). La publika transdono de la koncernaj atestoj okazis en San Marino jam 1990-09-09 dum la ferma solenaĵo de SUS 7; la publika transdono de la dokumentoj mem okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 8.

Respubliko de San Marino, 1990.09.09/1690pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,

(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,

(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj

(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 8-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS 8) okazinta en Białystok (Pollando)

la sciencistajn gradojn

„Magister scientiarum humanarum (Mag.sc.hum.)“ – t.e. magistro pri humanistiko – al

Leon KOBIELA el Szczecin (PL) *1912-11-05 en Zawory (PL), en la fako „ekonomiko“ (dokumento 1690 M 005)

„Magister scientiarum philosophicarum (Mag.sc.phil.)“ – t.e. magistro pri filozofio – al

Andrzej LEWKOWICZ el Jarocin (PL) *1960-04-28 en Orneta (PL), en la fako „teologio“ (dokumento 1690 M 004)

„Doctor scientiarum humanarum (Dr.sc.hum.)“ – t.e. doktoro pri humanistiko – al

Axel ASSMANN el Düsseldorf (D) *1958-04-13 en Düsseldorf (D), en la fako „psikologio“ (dokumento 1690 D 002)

„Doctor scientiarum naturalium (Dr.sc.nat.)“ – t.e. doktoro pri natursciencoj – al

Lev MEDVEDEV el Moskva (SU) *1948-01-01 en Jutaza (SU), en la fako „biologio“ (dokumento 1690 D 003)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1990-09-25/1691pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la polaj universitatecaj kleigejoj aliĝintaj kaj aliĝontaj al la interkonsento de 1989-12-01 subskribita kun aprobo de la ministro pri nacia klerigado de 1989-11-17 la supre surlistigitajn 4 agnoskojn estats enskribitaj en la „REGISTRON de eksterlandaj kaj polaj apartenantoj al la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies ... internaciaj sciencistaj gradoj kaj titoloj ... estas en la latina lingvo agnoskataj ...“ (n-roj 11–14). La publika transdono de la koncernaj atestoj okazis en Białystok jam 1990-09-21 dum la ferma solenaĵo de SUS 8; la publika transdono de la dokumentoj mem okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 9.

Białystok, 1990.09.25/1690pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,

(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,

(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj

(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 9-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS 9) okazinta en Białystok (Polando)

la sciencistajn gradojn

„Baccalaureatus scientiarum humanarum (Bac.sc.hum.)“
– t.e. bakalaŭro pri humanistiko – al

Antoni GOLONKA el Gliwice (PL) *1934-06-27 Pojawie (PL), en la fako „lingvistiko“ (dokumento 1690 B 002)

Tatjana PETUŜKOVA el Moskva (SU) *1959-11-27 Jelec (SU), en la fako „muzikpedagogio“ (dokumento 1690 B 004)

„Baccalaureatus scientiarum structuralium (Bac.sc.struct.)“
– t.e. bakalaŭro pri struktursciencoj – al

Dana VRĂJITORU el Iaşi (RO) *1969-02-01 Iaşi (RO), en la fako „matematiko“ (dokumento 1690 B 003)

„Magister scientiarum humanarum (Mag.sc.hum.)“
– t.e. magistro pri humanistiko – al

Danuta SADOWNIK el Jelenia Góra (PL) *1957-03-03 en Lwówek Śląski (PL), en la fako „pedagogio“ (dokumento 1690 M 006)

Lidia LIGĘZA el Kraków (PL) *1942-06-15 en Nowy Sącz (PL), en la fako „filologio“ (dokumento 1690 M 007)

Ana VRĂJITORU el Iaşi (RO) *1946-01-29 en Craiova (RO), en la fako „lingvo kaj literaturo rumana“ (dokumento 1690 M 008)

„Magister scientiarum morphologicarum (Mag.sc.morph.)“
– t.e. magistro pri morfosciencoj – al

Alicja LEWANDERSKA el Gliwice (PL) *1939-05-12 en Kołomyja (PL), en la fako „etnografio“ (dokumento 1690 M 009)

„Magister scientiarum naturalium (Mag.sc.nat.)“
– t.e. magistro pri natursciencoj – al

Jan Wacław PIÓRO el Piastów (PL) *1926-06-23 en Warszawa (PL), en la fako „kemio – organika teknologio“ (dokumento 1690 M 010)

„Doctor scientiarum naturalium (Dr.sc.nat.)“
– t.e. doktoro pri natursciencoj – al

Jan Wacław PIÓRO el Piastów (PL) *1926-06-23 en Warszawa (PL), en la fako „kemio – organika teknologio“ (dokumento 1690 D 004)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1991-03-03/1691pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la polaj universitatecaj kleigejoj aliĝintaj kaj aliĝontaj al la interkonsento de 1989-12-01 subskribita kun aprobo de la ministro pri nacia klerigado de 1989-11-17 la supre surlistigitajn 9 agnoskojn estats enskribitaj en la „REGISTRON de eksterlandaj kaj polaj apartenantoj al la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies ... internaciaj sciencistaj gradoj kaj titoloj ... estas en la latina lingvo agnoskataj ...“ (n-roj 15–23). La publika transdono de la koncernaj atestoj okazis en Białystok jam 1991-03-02 dum la ferma solenaĵo de SUS 9; la publika transdono de la dokumentoj mem okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 10.

Białystok, 1991.03.03/1690pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

. . . .

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,

(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,

(3) scienca laboraĵo (disertacio) kaj

(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la 10-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 10) okazinta en San Marino

la sciencistajn gradojn

„Baccalaureatus scientiarum philosophicarum (Mag.sc.phil.)“
– t.e. bakalaŭro pri filozofio – al

Vinko OŜLAK el Klagenfurt (A) *1947-06-23 en Slovenj Gradec (YU), en la fako „historio de filozofio“ (dokumento 1691 B 001)

„Magister scientiarum philosophicarum (Mag.sc.phil.)“
– t.e. magistro pri filozofio – al

Antoni Maria RYŚ el Chiavari (I) *1956-07-01 en Wadowice (PL), en la fako „filozofia logiko“ (dokumento 1691 M 001)

„Doctor scientiarum humanarum (Dr.sc.hum.)“
– t.e. doktoro pri humanistiko – al

Vera BARANDOVSKÁ el Ostrava (CS) *1952-08-17 en Opava (CS), en la fako „interlingvistiko kaj historio de antikvaj lingvoj“ (dokumento 1691 D 001)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1991-09-09/1691pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la Respubliko de San Marino la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo enskribigis la supre surlistigitajn 3 agnoskojn la 1991-09-09/1691pfR en la „REGISTRON de eksterlandanoj portantaj akademiajn titolojn kies grado estas latinforme agnoskata en San Marino post kiam ili sukcese plenumis suplementajn studojn kaj sukcese trapasis ekzamenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino“ (n-roj 83–85). La publika transdono de la koncernaj atestoj okazis en San Marino jam 1991-09-08 dum la ferma solenaĵo de SUS 10; la publika transdono de la dokumentoj mem okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 11.

San Marino, 1991.09.09/1691pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

agnoskis surbaze de

(1) eksterlande jam akirita, formale minimume samranga akademia grado aŭ titolo - aŭ ĉe AIS atingita aŭ senpere valida antaŭa ŝtupo,

(2) kromaj studoj kun sukcese plenumitaj kursfinaj kaj (kaze ke tion postulas la ekzamenregularo) tutfakaj ekzamenoj,

(3) scienca laborajo (disertacio) kaj

(4) internacilingva finekzameno kun publika kandidatprelego kaj diskuto kun internacia ekzamenkomitato dum la rumana studadsesio de AIS inaŭguranta la AIS-filion en Rumanio - Sibiu/Hermannstadt

la sciencistan gradon

„Magister scientiarum humanarum (Mag.sc.hum.)"
– t.e. magistro pri humanistiko – al

Serenella GIACCHINO TERRUZZI el Milano (I) *1927-04-28 en Milano (I), en la fako „franca literaturscienco" (dokumento 1691 M 001)

LI Renzhi el Paderborn (D) *1965-04-27 Tong hua (CHN), en la fako „esperantologio" (dokumento 1691 M 002)

La dokumentoj estas subskribitaj kaj stampitaj kun la dato 1991-10-11/1691pfR. Por esprimi la agnoskon de la tiaforme donitaj akademiaj gradoj en la Respubliko de San Marino la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo enskribigis la supre surlistigitajn 2 agnoskojn la 1991-10-11/1691pfR en la „REGISTRON de eksterlandanoj portantaj akademiajn titolojn kies grado estas latinforme agnoskata en San Marino post kiam ili sukcese plenumis suplementajn studojn kaj sukcese trapasis ekzamenon de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino" (n-roj 5–6). La publika transdono de la koncernaj atestoj okazis en Sibiu/Hermannstadt jam 1991-10-11 dum la ferma solenaĵo de la unua rumana studadsesio en Sibiu/Hermannstadt; la publika transdono de la dokumentoj mem okazos dum la inaŭgura solenaĵo de SUS 11.

Sub la numeroj 1–3 estas krome registritaj la jam transdonitaj, en la registron ĉe la Dikastero pri Klerigado kaj Kulturo en San Marino enskribitaj dokumentoj 1690 B 001 de Bac.sc.hum. LI Renzhi, 1688 M 003 de Mag.sc.cyb. Joanna LEWOC kaj 1686 H 001 de Dr.sc.cyb.habil. Helmar FRANK.

Aprezante la elstarajn humanecajn kvalitojn kaj la kvalifikitajn meritojn por la scienco kiel la efikan kunlaboron kaj apogon dum la plenumado de siaj taskoj, AIS donis en interkonsento kun sia kompetenta sekcio honorkaŭze internacian sciencistan titolon kune kun ĉiuj al ili ligitaj rajtoj. Fariĝis

„Magister scientiarum humanarum honoris causa (Mag.sc.hum.h.c.)"
– t.e. Honora Magistro pri humanistiko –

Marina MICHELOTTI GRAZIOSI el San Marino Città (RSM) dokumento 1691 HM 001, ekapartenanta kiel Adjunkto Scienca (ASci. - dokumento 1691 AS 009) por la fako „lingvoinstruado" al la fakaro 2.2 de AIS

La dokumento estas subskribita kaj stampita kun la dato 1991-09-08/1691pfR (n-ro 4). La enskribo de la honorkaŭza titoligo en la supre menciitan REGISTRON okazis 1991-10-11. La publika transdono de la dokumento al la honorigito okazis dum la inaŭgura solenaĵo de la prov-SUS en Sibiu/Hermannstadt.

Sibiu/Hermannstadt, 1991.10.11/1691pfR
La Direktoro de la Ekzamenoficejo kaj
Vicprezidanto de AIS: *OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.*

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.